

AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ

Accademia
Internazionale
delle Scienze

International
Academy
of Sciences



San-Marino

Internationale
Akademie der
Wissenschaften

Académie
Internationale
des Sciences

32-a SANMARINECA UNIVERSITATA STUDADSESIO

SUS 32

Sibiu-Hermannstadt (RO)

2011-09-23 / 10-01

(1711 pfR/dfR)

Zweiunddreißigste Sanmarinesische Universitäre Studientagung

Trentaduesima Sessione Universitaria Sammarinese

Thirty-second Sanmarinian University Session

Trente-et-deuxième Séance Universitaire Sanmarinienne

*Laborlingvoj · lingue di lavoro · Arbeitssprachen · working languages · langues de travail
la Internacia Lingvo (ILO) · italiano · Deutsch · English · français · română*

Enhavo

1	Oficialaĵoj	3
2	Kursoj kaj prelegoj	3
2.1	Sciencaj kursoj	3
2.2	Lingvokurso	4
2.3	Liberaĵ, docentiĝaj kaj debutaj prelegoj (konferencprogramo de SUS 32) . . .	4
2.3.1	Konferenco pri didaktiko	4
2.3.2	Aliaj SUS-prelegoj	4
3	Kandidataj finekzamenoj	5
4	Kadra Programo	5
5	Organizaj detaloj	6
5.1	Kursoj kaj kursfinaj ekzamenetoj	6
5.2	Prelegoj	6
5.3	Administrado	6
5.4	Aliĝo	7
5.5	Mono	7
5.6	Salonoj	7
6	Instruteko	8
7	Situo de Sibio	9
7.1	Sibio, Transilvanio kaj Rumanio	9
7.2	Trafiko	9
7.2.1	Kiel iri al Sibio	9
7.2.2	Kiel moviĝi en Sibio	9
7.3	Pliaj informoj	10
	Programtabelo	12

Programo de SUS 32

La studadsesio SUS 32 de AIS okazas en Sibiu-Hermannstadt (RO) en ejoj de Universitato „Lucian Blaga“ (ULBS). Ĝi estas ligita al konferenco pri „komunikado, kreiveco, esploro en didaktika profesio“ (rumane: *comunicare, creativitate, cercetare în profesiunea didactică*), kiu okazos je la SUS-komenca sabato post la inaŭguro.

La tempoj indikitaj en tiu ĉi eldono estas provizoraj kaj povas ŝanĝiĝi. Bonvolu atenti informojn afiŝitajn de la SUS-sekretariejo. Gravaj novaĵoj estas anoncataj ĉe la du SUS-ejoj:

- DPPD (*Departamentul pentru Pregătirea Personalului Didactic* = departemento pri edukado de didaktika personaro) en strato *Dumbrăvii* 34, ĉe placo *Aurel Vlaicu*. La domo portas grandan surskribon de la jura fakultato „Simion Barnuțiu“.
- La departemento pri protestanta teologio ĉe bulvardo *Victoriei* 40. Ĝi estas en la sama strato kiel la fakultato pri homsciencoj (*facultatea de litere și arte*), kie situas DAI-ULBS, la Departemento Akademia Internacia de AIS ene de ULBS.

Mapeto sur paĝo 11 montras la situon de la ejoj. Bonvolu atenti, ke la mapeto estas nur skizo kaj ne montras ĉiujn stratojn.

1 Oficialaĵoj

dato	tempo	evento	ejo
09-23 ven	vespere	Interkona vespero	
09-24 sab	9:00–10:00	Solena inaŭguro	Teologio
	10:00–10:30	Senatkunsido	DPPD
	10:30–11:00	Asembleo de la Subtena Sektoro	DPPD
	10:30–12:00	Plenkunsido de la didaktika konferenco	DPPD
			Prelego de OProf. Pennacchietti
	14:00–19:00	Sekciaj kunsidoj de la didaktika konferenco	DPPD
09-26 lun	vespere	Sekcikunsidoj	Teologio
09-27 mar	vespere	Akademia Forumo	Teologio
09-28 mer	14:00	Asembleo de SubS (daŭrigo)	Teologio
	15:00	Ĝenerala Asembleo de la SciS	Teologio
	vespere	Akademia Forumo (daŭrigo)	Teologio
10-01 sab	9:00	studfinaj ekzamenoj	Teologio
	posttagmeze	ĜA de SciS (daŭrigo)	Teologio
	posttagmeze	fermo de SUS 32	Teologio

2 Kursoj kaj prelegoj

2.1 Sciencaj kursoj

La sekvaĵoj – valoraj po inter 0,5 kaj 1,0 stud-unuoj (stu) – okazos ekde lundo ĝis vendredo (09-26/30), en blokoj nomataj A/B/C/D¹. La longa paŭzo tagmeza nomiĝas M. La kursestroj kaj kursanoj povas interkonsenti pri paŭzo dum la blokoj kaj kompensa plilongigo. Ĉiu kurso okazos komplete antaŭ aŭ komplete post merkredo. Merkredo estas rezervita al kunsidoj kaj prelegoj.

	A	B	M	C	D
tempo	9:00–10:30	11:00–12:30	12:30–14:30	14:30–16:00	16:30–18:00

Sekcio 1: Kibernetiko

K1 OProf. Dr. Reinhard Fössmeier (Munkeno, DE)

Sekureco en cifereca komunikado: aŭtentikeco kaj ĉifrado (ĵaŭdo/vendredo, blokoj A, B)

Sekcio 2: Humanistiko

H1 AProf. Dr. habil. Věra Barandovská-Frank (Paderborn, DE)

Dialogo kaj interkompreno en interlingvistika laboro de Otto Jespersen (ĵaŭdo/vendredo, blokoj C, D)

Sekcio 4: Filozofio

F4 OProf. Dr. habil. Eva Poláková (Komárno, SK)

Scienco, filozofio kaj etiko (lundo/mardo, blokoj A, B)

¹Por eviti miskomprenojn ni ne uzas la literon Ĉ por marki blokon.

Sekcio 6: Morfosciencoj

M1 EProf. ADoc. Mag. Alicja Lewanderska-Quednau prof dr (Haag, DE)

Eŭrologio (ĵaŭdo, blokoj A, B)

Spegule pri eŭropaj problemoj ekde Ligo de Nacioj, Eŭropa klubo, AIS, ĝis EU kaj aktualaj problemoj. Paneŭropa Manifesto de Richard Nikolaus Coudenhove-Kalergi, rolo de lia posteulo Otto von Habsburg. E-ta sekcio en Paneŭropa Unio – por unuiĝo de Eŭropo – superpartie, Esperantista ideo de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo. Rolo de prof Frank pri ideo krei la fakon pri Eŭrologio (la dua simila nur agas en PL – sub la nomo *europaistika* – kaj subskribis kun AIS kontrakton). Dum UK aperis propono uzi por fako nomon *eŭropistika*. Leĝoj, problemoj kaj espero – flanke de EU. Eŭropo – hieraŭ, hodiaŭ kaj morgaŭ. Ĉu ni ĉiuj estas eŭropanoj – ĉar ni loĝas kaj vivas en Eŭropo.

M2 EProf. Boĵidar Leonov (Karlovo, BG)

Bazaj principoj de patent- kaj scienc-teknika informado (lundo, blokoj A–D)

M3 EProf. Dr. Ljubiša Preradović (Banja Luka, BH)

SPSS – priskriba statistiko (lundo/mardo, blokoj A, B)

2.2 Lingvokurso

Komence de SUS 32 okazas ILo-kurso por komencantoj. Detaloj estas afiŝe sciigitaj.

2.3 Liberaj, docentiĝaj kaj debutaj prelegoj (konferencprogramo de SUS 32)

Liberaj kaj projekt-akceptigaj prelegoj okazas en la sekciaj salonoj, sub la gvido de la dekanoj aŭ de iliaj komisiitoj. Dum SUS 32 ili pliparte okazas merkrede antaŭtagmeze.

2.3.1 Konferenco pri didaktiko

Sabate, komence de SUS 32 okazas konferenco pri komunikado, kreivo, esploro en didaktikaj profesioj (rumane: *Comunicare, creativitate, cercetare en profesiunea didactică*. Ĝi komenciĝas post la inaŭguro, je la 10:30 horo, per prelego de OProf. Pennacchietti, prezidanto de AIS, al la plenkunsido.

- OProf. Fabrizio Pennacchietti dr: **Fenico-punikaj vortoj en eŭropaj lingvoj.**

Posttagmeze okazas apartaj kunvenoj de la rumana kaj internacia sekcioj. La prelegoj en ĉi-lastaj estas parte en ILo kaj estas konsiderataj kiel SUS-prelegoj. Prelegas:

- OProf. Dr. habil. Eva Poláková: Etiko de scienca komunikado
- PDoc. Dr. habil. Arno Warzel: Pri la komunikadteorio de Schulz von Thun.
- OProf. Dr. Günter Lobin: Pri la enobjektigado de la instruo.
- EProf. ADoc. Dr. Ljubiša Preradović: Boriša Milićević – bi(bli)ografio (reordigita) 1954 – 2011, okaze de la 80-jariĝo kaj 58 jaroj de aktiva Esperanto-laboro.
- EProf. ADoc. Mag. Alicja Lewanderska-Quednau prof dr: Politologio en teorio kaj praktiko
- Ioana-Narcisa Crețu conf univ dr
- Liane Junesch lect univ mag dr

Pri la konferenco estas aparta, pli detala programo.

2.3.2 Aliaj SUS-prelegoj

H-p1 ADoc. Zlatko Hinšt dr sc, dipl oec, prof

Prezroj kaj eksteraj efikoj kiel determiniloj de ekonomia situacio de fervoja sistemo.
(me, 09:00)

H-p2 EProf. ADoc. Mag. Lewanderska-Quednau prof dr

Kio estas etno-identeco-asimilado? Kio estas diasporo? (merkredo, 9:45)

Diasporoj – pola, juda, albana kaj germana. Ĉu romaoj kreas diasporon? Kiajn rajtojn – reale havas etnaj minoritatoj en nuna mondo – kio estas etna minoritato? Rolo de ĵurnalistoj por kreado de identeco de homo (kelkaj informoj pri ĵurnalistika fako de AIS en sekcio 6. Loko Karlovo (BG) kaj Szczecin-Warszawa (PL) kaj konkorda kunagado kun TEJA)

H-p3 ADoc. Zlatko Hinšt dr sc, dipl oec, prof
Eksteraj efikoj kaj ilia internalizado. (ve, 09:00)

F-p1 OProf. Hans Dietrich Quednau dr
La instruteko de AIS (mardo, M)

F-p2 ADoc. Dr. Eugen Macko
Dialogika kompreno kaj Esperanto. (ma, 09:00)

M-p1 EProf. ADoc. Mag. Lewanderska-Quednau prof dr
Fantazia mondo – kiel espero kaj ŝanco, sed ankaŭ danĝero por infanoj, malsanuloj kaj maljunuloj. (merkredo, 10:30)

M-p1 EProf. ADoc. Mag. Lewanderska-Quednau prof dr
Lucian Blaga, patrono de ULBS. (merkredo, 11:15)

M-p2 EProf. ADoc. Dr. Ljubiša Preradović
Religiaj objektoj de naciaj minoritatoj en Respubliko Serba (lundo, M)

3 Kandidataj finekzamenoj

La finekzamenoj por kandidatoj, kiuj celas originale aŭ per adapta adopto akiri ĉe AIS la agnoskon de akademia nivelo (bakalaŭreco, magistrecio, doktoreco aŭ habilit-doktoreco), okazas je sabato: (10-01), laŭ surloke afiŝota horaro.

La kandidatprelegoj estas publikaj, kaj ĉiuj SUS-anoj estas bonvenaj ĉeesti la prelegojn de la kandidatoj kaj la postajn diskutojn. Parolaj fakekzamenoj (nepublikaj) kaj skribaj ekzamenoj (se necesaj) okazas laŭ horaro afiŝota de la Ekzamenofico.

Kandidatoj, pri kies dokumentoj estas iuj duboj, bonvolu jam antaŭ SUS interkonsenti kun la ekzamen-ofico pri la procedo por klarigi la dubojn. Ne okazas publikaj konsult-horoj.

La senato de AIS decidis, ke kandidatoj el reform-eŭropaj kaj kompareblaj landoj havu dum SUS 32 75%-an rabaton je siaj ekzamen-kotizoj.

Por eviti problemojn bv. rekontroli, ĉu ĉiuj viaj ekzamen-dokumentoj jam troviĝas ĉe la Ekzamenofico!

Ĉiu kandidato antaŭ sia finekzameniĝo nepre devas esti enskribiĝinta al minimume du (2) sciencaj SUS-kursoj (se li ne jam havas la bezonatajn kurs-atestojn). Inter la du kursoj unu devas esti en la sekcio, en kiu okazas la kandidatigiĝo, unu devas esti el alia sekcio. Entute estas bezonataj kvar (4) atestitaj kursaj studunuoj; nur por adapta adopto sufiĉas, laŭ la novaj regularoj, la du SUS-kursoj.

La Ekzamenofico atentigas kandidatojn, ke prezentiĝo al la fina ekzameno sen antaŭa regularkonforma kompletigo kaj disponigo de ĉiuj necesaj dokumentoj al la Ekzamenofico povas kaŭzi aŭ **malakcepton** de la kandidatigiĝo aŭ **postulon de krompago** superanta la normalan ekzamenkotizon pro la kroma laboro.

4 Kadra Programo

Laŭtradicie AIS invitas ĉiujn SUS-anojn al la partopreno en la **Akademia Forumo** (2011-09-27/28) kun publika diskuto.

Okazas kunsido de la **Subtena Sektoro** (2011-09-24/28) kaj **ĝenerala asembleo (ĜA) de la Scienca Sektoro** (2011-09-28). Tie voĉdoni rajtas la subtenaj membroj resp. la efektivaj membroj. En la ĜA krome ĉiuj adjunktoj havas la rajton ĉeesti; asociitaj docentoj (ADoc) havas krome la parolrajton. Estas planite, ke la pliparto de la diskutoj okazu merkrede, por ebligi al ĉiuj SUS-anoj la partoprenon.

La sekcioj de la Scienca Sektoro laŭeble elektu dum siaj kunsidoj sian estraron por la periodo 2012–2015.

5 Organizaj detaloj

Ĉiu intereso rajtas aliĝi al SUS. Ne necesas formalaj sciencaj kvalifikoj.

5.1 Kursoj kaj kursfinaj ekzamenetoj

Ĉiu SUS-ano rajtas senpage enskribiĝi kaj partopreni kursojn (tion inkluzivas la aliĝkoto). Kontraŭ aparta kotizo (po 0,3 AKU por unu kurso) oni ricevas oficialan partopren-ateston, ĉeestinte minimume 3/4jn, kaj noton, se oni sukcesis en la kursfina ekzameneto. La ekzameneton oni rajtas partopreni sen ĉeesti la kurson dum la sama SUS, do iamaj kursanoj povas ripeti la ekzameneton.

Ankaŭ pri kursoj ofertataj en la *instruteko* (vidu ĉapitron 6) povas okazi ekzamenetoj por studentoj, kiuj aŭtodidakte preparis sin.

La kursfinaj ekzamenetoj de la sciencaj kursoj okazas laŭ anonco de la kursestroj. La SUS-anoj, kiuj intencas akiri kurs-atestojn, enskribiĝu al la kursoj ĉe la SUS-oficejo komence de SUS aŭ anoncu sian intencon dum la unua leciono.

5.2 Prelegoj

La preleg-kunsidojn gvidas la dekanoj aŭ vicdekanoj de la koncerna sekcio, aŭ komisiitoj de ili. La partopreno en prelegoj (kontraŭe al partopreno en kunordigita preleg-serio) ne egalvaloras al kurspartopreno kaj ne rezultigas stud-unuojn.

Debutprelegojn prezentas nove alvokitaj profesoroj, *docentiĝprelegojn* estontaj plenrajtaj docentoj de AIS. La prelegoj daŭras po 40–60 minutojn, inkluzive de diskuto kaj paŭzeto. La preleglingvo estas ILo.

La sama tempo estas je dispono por *invititaj prelegoj* (en iu ajn oficiala lingvo de AIS) kaj por *projekt-akceptigaj prelegoj* (en ILo) de kandidatoj, kiuj celas estontan originalan akiron (ne adopton) de grado de AIS.

Ankaŭ liberaj ISKanoj (t. e. ISKanoj, kiuj ankoraŭ ne kiel adjunktoj aŭ efektivaj membroj apartenas al AIS) rajtas prezenti t. n. *liberajn prelegojn*, pere de la dekanato de la koncerna sekcio. Tiaj prelegoj rajtas okazi en iu ajn oficiala lingvo de AIS kaj daŭri po 25–40 minutojn.

Ankaŭ *konciz-prelegoj* (10–20 minutoj) povas okazi en ajna oficiala lingvo de AIS. Ili estas oferteblaj ankoraŭ post la starigo de la SUS-programo, tra la koncerna (vic)dekanato aŭ (vic)fakarestro. Temoj de konciz-prelegoj ne listigitaj en la programkajero estos afiŝataj dum SUS laŭ la informoj transdonitaj de la prelegantoj al la SUS-oficejo. Laŭeble la prelegantoj mem pretigu du identajn A4-foliojn afiŝeblajn.

5.3 Administrado

La sekretario de SUS 32 funkcios lunde, marde, ĵaŭde kaj vendrede en la matena kurspaŭzo je la 10:45, krome laŭ interkonsento.

5.4 Aliĝo

Aliĝilojn bonvolu sendi al la senata sekretario (Dr. Reinhard Fössmeier, Rahel-Straus-Weg 19, DE-81673 München, Germanio; retpoŝto informo(heliko)ais-sanmarino.org). Informoj pri SUS 32 troviĝas rete ĉe

<http://www.ais-sanmarino.org/arangxo/sus/sus32>.

Studentoj kun valida studenta numero povas aliĝi neformale per simpla retmesaĝo.

Bonvolu atenti, ke aliĝoj ne estas trakteblaj sen pago de la aliĝkotizo. La kotizo ne inkluzivas ekzamenkostojn, kurskotizojn (por ricevo de atesto), kostojn por loĝado kaj manĝado. Aliĝo ne estas transdonebla.

SUS ne asekuras siajn partoprenantojn kontraŭ malsano, akcidentoj aŭ io alia. Bonvolu atenti, ke multaj malsan-asekuroj ne kovras malsanon en eksterlando. Konsilindas speciala asekuro por eksterlandaj vojaĝoj.

Pagi aliĝkotizon devas ankaŭ *kursgvidontoj* kaj *prelegontoj*; ili ricevos sian kotizon post sia kontribuo. Kurs- kaj prelegproponoj kaj aliĝoj por ekzameno estas trakteblaj nur post alveno de la SUS-aliĝkotizo.

Ĝis kvar semajnojn antaŭ la komenco de la sesio (t. e. ĝis 2011-08-26) la aliĝkotizo estas nur 0,3 AKU, poste 0,5 AKU. Kotizo por unutaga partopreno en SUS estas po 0,2 AKU. Partoprenantoj el reform-eŭropaj landoj rajtas je rabato de **75 %**. La kotizo estas pagebla laŭ jenaj vojoj (ĉiam kun indiko de la pagoceleto kaj de la nomo de la aliĝanto):

- al la Germana konto 2051-305 de AIS ĉe Postbank Hannover, banko-kodo 25010030, Swift-kodo PBNKDEFF250; IBAN DE19 2501 0030 0002 0513 05, BIC: PBNKDEFF.
- al la UEA-konto de AIS: aisc-j. (Eblas kreditkarte pagi al sia UEA-konto.)
- Pro la altaj bankokostoj ni petas ne sendi ĉekojn.

ISKanoj, kies servobonhavo havas krediton de almenaŭ 0,5 AKU, povas simple deprenigi la kotizon de ĝi. Dumvivaj subtenaj membroj kaj studentoj kun valida studenta numero ne pagas SUS-kotizon, se ili aliĝas minimume unu monaton antaŭ la sesio; poste ili pagas 0,2 AKU.

5.5 Mono

Kadre de AIS kostoj kaj prezoj estas indikataj en „Akademiaj Kotiz-Unuoj“ (AKU). 1 AKU nun valoras € 65,00. Dum SUS 32 AIS akceptas pagojn nur en eŭroj kaj novaj rumamaj leoj (RON), la loka valuto de Sibio.

5.6 Salonoj

Dum SUS 32 la tradiciaj nomoj de la SUS-salonoj estas dinamike atribuitaj laŭ la okazantaj aranĝoj. La tradiciaj nomoj estas tiuj de jenaj eminentuloj:

ARISTOTELO de Stagira / *Ἀριστοτέλης* (384–322 a. K.)

Helena filozofo, fondinto de la empiria naturscienco en la kadro de ampleksa empiria sistemo kondukanta de la logiko ĝis la ŝtatteorio. Liaj instruoj ĝis la fino de la mezepoko restis la fundamento de sciencaj instruado kaj esplorado. Li estis disĉiplo de Platono kaj instruisto de Aleksandro la Granda.

Georges BOULANGER (1909–1982)

Fondinto (en 1957) de *Association Internationale de Cybernétique* (Namur, BE) kaj ties prezidanto ĝis sia morto; en 1980 enkondukis en tiun asocion ILon kiel trian laborlingvon, eklerninte ĝin kiel 70-jarulo. Vicprezidanto de Eŭropa Klubo kaj membro de ties iniciat-grupo AIS.

René DESCARTES, Latine: Renatus Cartesius, ILe: Kartezio (1596–1650)

„La patro de la moderna filozofio“, kiel oni ofte nomas lin, provis ligi filozofion al la natursciencoj aplikante al ambaŭ racian metodon. Sian mekanikan mondkoncepton li aplikis eĉ en psikologio. Li skizis ankaŭ principojn de planlingvo en sia letero de la 20-a de novembro 1629 al la benediktana scienculo *Mersenne*.

EŬKLIDO de Aleksandrio / *Ευκλείδης* (ĉ. 365–ĉ. 300 a. K.)

Helena matematikisto kaj naturesploristo, kiu laboris sub Ptolemeo (Ptolemaios) la 1-a ĉe la „Museion“ en Aleksandrio. Lia plej fama verko estas la libro „Elementoj“, aksioma prezento de la tutaj tiamaj geometrio kaj aritmetiko. Krome li verkis manlibron „Geometria optiko“ kaj aliajn traktaĵojn pri planimetrio, sfero kaj matematika muzikteorio.

Galileo GALILEI, ILe: Galilejo (1564–1642)

Kvankam liaj ideoj troviĝas kadre de la kristana mondkoncepto, la Itallingva natursciencisto konfliktis kun la katolika eklezio pro sia verko pri la galaksi-modeloj, en kiu li argumentas por nova, kies centro estas la suno. Kiel unu el la unuaj sciencistoj li verkis ne plu en la Latina lingvo, nekomprenata de vasta publiko.

Mohandas Karamchand GANDHI / *मोहनदास करमचन्द गांधी* (1869–1948)

Barata (hinda) politikisto, kiu proklamis senbatalilan ribelon kontraŭ la okupadaj trupoj, per manŝpinado kontraŭ la teksaj fabrikoj de Britio, per „salmarŝo“ kontraŭ la brita salmonopolo, per reiro al simpla natura vivoformo, por formi sendependan komunan ŝtaton de hinduoj kaj islamanoj. Li subtenis la ideon de la Internacia Lingvo, kunlaborante kun la svisa sciencisto *Edmond Privat*.

Jan Amos KOMENSKÝ, Latine: Iohannes Amos Comenius. ILe: Komenio (1592–1670)

La fondinto de la moderna pedagogio ne nur teorie, sen ankaŭ praktike kontribuis al sia fako, i.a. per facila lingvoinstrua legolibro. Li proponis la enkondukon de planlingvo kaj la starigon de internacia akademio de la sciencoj.

Giuseppe PEANO (1852–1932)

La Itala matematikisto interalie starigis sistemon por aksioma difino de la naturaj nombroj. En 1903 li prezentis planlingvan projekton de simpligita Latino, nomatan „*Latino sine flexione*“; en tiu lingvo li eldonis sian verkon *Formulario Mathematico*. Ek de 1909 li estis prezidanto de la planlingva akademio *Academia pro Interlingua*.

Hermann SCHMIDT (1894–1968)

Jam en la jaro 1941 la Germana fizikisto kaj regulad-teknikisto prezentis la bazajn principojn de kibernetiko. Ek de ĉ. 1962 li pli kaj pli influis la filozofion de klerig-kibernetiko kaj de aliaj antropokibernetikaj branĉoj.

6 Instruteko

Dum SUS 32 eblas akiri studunojn ankaŭ surbaze de memstara studado de kursoj el la instruteko de AIS, se la kandidato sukcesas en kursfina ekzameno per noto de minimume 7/10. La ekzameno povas okazi dum SUS 32, se la kandidato sciigas sian deziron kun indiko de la elektita(j) kurso(j) plej malfrue **ses semajnojn** antaŭ la malfermo de SUS 32 al la ekzamen- kaj klerigofico (OProf. H. D. Quednau, Forstwissenschaftliche Fakultät, Am Hochanger 13, DE-85354 Freising).

Superrigardo pri la Interretaj kursoj de AIS troviĝas ĉe <http://www.ais-sanmarino.org/kursoj/>. Sed ne ĉiuj tiuj kursoj estas disponeblaj por ekzameno dum SUS 32. Ĉe intereso bonvolu informiĝi ĉe la klerigofico.

7 Situo de Sibio

7.1 Sibio, Transilvanio kaj Rumanio

Sibio (rumane *Sibiu*, germane *Hermannstadt*, hungare *Nagyszeben*) situas centre en Rumanio, je alto de 407 metroj super marnivelo; ĝi estas ĉefurbo de la samnoma distrikto. En la historia regiono Transilvanio (*Siebenbürgen*, *Erdély*) ĝi situas ĉe la suda rando, nur kelkajn kilometrojn norde de la Karpatoj. Dum jarcentoj ĝi havis loĝantaron pliparte germanlingvan. En 2011 Sibio havas ĉ. 155.000 loĝantojn (2 % estas hungar-etnaj, 1,6 % german-etnaj).

7.2 Trafiko

7.2.1 Kiel iri al Sibio

Sibiu posedas internacian flughavenon kun regulaj flugoj de/al pluraj urboj interalie en Rumanio, Aŭstrio, Germanio, Hispanio kaj Turkio. Urboj en Grekio kaj Italio estas atingeblaj tra Timișoara. La flughaveno estis komplete rekonstruita en 2007. Ĝia retejo estas www.sibiuairport.ro; ĝi informas en la rumana kaj la angla.

Aŭte Sibio estas atingebla per la rumanaj naciaj vojoj DN 1 (E 68) kaj DN 7 (E 81). Fervojoj linioj ekzistas al Vințu de Jos, Brașov kaj Mediaș, sed ili ne havas tre oftan trafikon.

Aŭtobusoj de/al aliaj urboj en Rumanio trafikas al/de bus-stacio ĉe la fervoja stacidomo. Internaciaj aŭtobusoj uzas alian stacion („Autogara 2“) sud-okcidente de la centro, proksime de la ponto de strato Alba Iulia sur rivero Cibin.

7.2.2 Kiel moviĝi en Sibio

Kvankam Sibio estas urbo de pli ol 150.000 loĝantoj, la kernaj partoj estas ne tre vastaj, kaj eblas piede atingi multajn gravajn lokojn. La SUS-ejoj distancas de la urbocentro nur ĉ. 1,5 kilometrojn, inter si unu kilometron. Ekzistas taksioj kaj aŭtobusoj (la trolebusa sistemo estis nuligita en 2009). Bus-biletoj ne estas aĉeteblaj en la busoj; necesas antaŭe aĉeti ilin ekzemple ĉe kioskoj. Ekzistas kelkaj aŭtomataj bilet-vendiloj, ekz. ĉe la stacidomo kaj la flughaveno. Eblas aĉeti tut-tagajn biletojn (*legitimăție zilnică*). Unuvojajn biletojn necesas stampi tuj post eniro en buson. Ili validas nur en tiu buso, ne post ŝanĝo al alia linio.

La retejo de la bus-kompanio Tursib estas www.tursib.ro; ĝi informas en la rumana lingvo kaj ofertas mapon de la linioj. En aŭgusto 2011 validis jena tarifo: 1,50 RON por simpla iro, tut-taga bileto 5,00 RON. Vid-al-vid de la ULBS-fakultato pri homsciencoj, bulvaro *Victoriei* 5–7, troviĝas kiosko (blanka) de Tursib.

Multaj bushaltejoj funkcias nur en unu direkto.

Estas konsilinde uzi nur tiajn taksiojn, kiuj skribe indikas la kilometran prezon (kutime iom pli ol 1,5 RON/km). La centra taksiejo estas sur *Piața Unirii*, antaŭ hotelo *Continental Forum* (eksa *Boulevard*).

SUS-ejoj. La SUS-programo okazos en DPPD kaj en la domo de la protestanta teologio de ULBS. Ili situas ĉ. 1,5 km sude de la urbocentro (*Piața Mare* = Granda Placo), en reciproka distanco de unu kilometro. La bushaltejo de DPPD estas placo *Aurel Vlaicu*, servata de kvar linioj; la domo de la teologia departemento situas inter la haltejoj *Transilvaniei*, *bazinul Olimpia* kaj *Universitate*; ĉi-lastan servas pluraj linioj.

Klimato. La vetero fine de septembro ofte estas ankoraŭ varma, kun meza temperaturo ĉirkaŭ 15 °C. Tamen bonvolu atenti, ke AIS estas sen-profeta asocio.

Telefonado. La internacia antaŭnumero de Rumanio estas **40** (Sibio: +40-269). Por konekto alilanden ciferumu **00**.

Kelkaj utilaj esprimoj en la rumana lingvo

Esperante	Rumane	Prononco
bonan matenon!	bună dimineața!	bună dimineaca
bonan tagon!	bună ziua!	bună ziua
bonan vesperon!	bună seara!	bună seara
ĝis revido!	la revedere!	la revedere
pardonu!	scuzați!	skuzacj'
mi petas	vă rog	vă rog
dankon!	mulțumesc	mulcumesk'
ne dankinde.	n-aveți pentru ce	navecj pentru ce
mi ŝatus...	aș vrea...	aș vrea'
ni ŝatus...	am vrea...	am vrea'
– trinki ion	– să beau/bem ceva	să beaŭ'/bem ceva'
– malgrandan bieron	– o bere mică	o bere mikă
– du bierojn	– două beri	doŭă berj
– la menukarton	– lista de meniuri	lista de meniurj'
la fakturon, mi petas	plata, vă rog	plata, vă rog
necesejo	toaletă	toaletă
– virinoj	– femei	femej'
– viroj	– bărbați	bărbacj'
kie estas...	unde este...	undejeste
la stacidomo	gara	gara
la placo...	piața...	pjaca
hotelo...	hotelul...	hotelul
la bushaltejo	stația de autobuz	stacja de aŭtobuz
bileton al...	un bilet spre...	un bilet' spre
du biletojn al...	două bilete spre...	doŭă bilete spre
tien kaj reen	dus-întors	dusântors'

(ă estas prononcata inter a kaj e; â/î estas prononcata inter a kaj u)

La oficiala lingvo de Rumanio estas la rumana. Minoritataj lingvoj estas oficialaj nur tie, kie la relativa kvanto de la parolantoj atingas 20 %; en Sibio tiel ne plu estas.

7.3 Pliaj informoj

Pli detalajn informojn pri Rumanio kaj Sibio donas Vikipedio (al kiu AIS regule kontribuas):

eo.wikipedia.org/wiki/Kategorio:Rumanio

eo.wikipedia.org/wiki/Sibiu

Vidindaĵoj en Sibio. Multaj vidindaj konstruaĵoj situas ĉe aŭ proksime de la centraj placoj Granda (*Piața Mare*) kaj Malgranda (*Piața Mică*). Eblas iri sur la Konsilian Turon (*Turnul Statului*), de kie estas bela vido sur la urbon. Ĉe strato Cetății (Harteneckgasse) konserviĝis granda peco de la historia urbomuro, kun fortikaĵaj turoj.

En la antaŭurboj, iamaj vilaĝoj, Turnișor (Neppendorf) kaj Gușterița (Hammersdorf) estas historiaj preĝejoj, ekkonstruitaj en la 13-a jarcento.

Telefona krizo-voko. Uzantoj de poŝtelefono povas ĉiulande atingi ĝeneralan krizo-servon per la numero 112. En Rumanio ĝi validas ankaŭ por kabloretaj telefonoj; per ĝi oni atingas la policon, la fajrobrigadon kaj ĝeneralajn savo-servojn.




Tabela programo de SUS 32

	sal.	A 9:00–10:30	B 11:00–12:30	M	C 14:30–16:00	D 16:30–18:00	V vespere
ven 23							Interkona vespero
sab 24	T D	9:00 Inaŭguro	10:00 SubS Int. konferenco prelego Pennacchiatti		Internacia konferenco (Comunicare, creativitate, cercetare ...)		
dim 25		Ekskurso al Ocna Sibiului (Salzburg)					
lun 26	T1 T2	Preradović Leonov	Preradović Leonov	P	Poláková Leonov	Poláková Leonov	sekcii- kunsidoj
mar 27	T1 T2	Preradović	Preradović	Q	Poláková	Poláková	A. Forumo
mer 28	T1 T2	Prelegoj			14:00 SubS	15:00 ĜA	A. Forumo
ĵaŭ 29	T1 T2	Lewanderska-Q. Fössmeier	Lewanderska-Q. Fössmeier		Barandovská-F.	Barandovská-F.	
ven 30	T1 T2	Prelegoj Fössmeier	Prelegoj Fössmeier		Barandovská-F.	Barandovská-F.	
sab dim		finaj ekzamenoj	finaj ekzamenoj			fino de ĜA	18:00 fermo
		foriro		↑	P/Q = prelegoj Preradović, Quednau, 13:45		

Kalendareto							
	lu	ma	me	ĵa	ve	sa	di
sep	19	20	21	22	23	24	25
	26	27	28	29	30	1	2
okt	3	4	5	5	7	8	9

SUS-ejoj

D = DPPD, calea Dumbrăvii 34 (550324 Sibio, ĉe placo Aurel Vlaicu)

T = Departamentul de Teologie Protestantă, bulevardul Victoriei 40 (500024 Sibio)

DAI-ULBS, bulevardul Victoriei 5–7 (500024 Sibio)

Bonvolu atenti la mapeton sur paĝo 11